der esperantist

Mitteilungsblatt der Esperantofreunde im Kulturbund der DDR

13. Jahrgang | Nr. 86 (6/1977) | 30 Pf

Pri la IX-a Kongreso de Kulturligo

Socialismo - Kulturo - Vivmaniero

Sub tiu ĉeflinia temo okazis en Berlin de la 22-a ĝis 24-a de septembro 1977 en la Palaco de la Respubliko la IX-a Kongreso de Kulturligo de GDR.

580 delegitoj kaj gastoj traktis pri tio, kiel la 208 000 membrojnhava socialisma kulturorganizo de GDR estonte povas respondi al la altaj celoj starigitaj en la programo de la Socialisma Unuiĝinta Partio de Germanio (SUPG) akceptita dum la IX-a Partia Kongreso en 1976. Partoprenis la kongreson altaj reprezentantoj el la kultura kaj socia vivo de GDR, inter ili la membro de la politburoo de SUPG *prof. Kurt Hager* kaj la ministro por kulturo, *Hans-Joachim Hoffmann.*

Plue partoprenis ankaŭ eksterlandaj gastoj.

Kulturligo de GDR, bone evoluanta organizo, al kiu ankaŭ apartenas la esperantistoj, povis pozitive bilanci. Dum la lastaj kvin jaroj okazis pli ol 374 000 kulturaj aranĝoj por pli ol 20 milionoj da loĝantoj en la urboj kaj komunumoj de GDR. 170 pentraĵ-galerioj aŭ la kulturpolitika agado de ĉirkaŭ 2 200 deputitoj de KL, de la komununa estraro ĝis al la Popola Parlamento, ĉio ĉi vigle atestas pri la grava rolo, kiun ludas Kulturligo en la publika socia vivo de GDR.

Dum la plenkunsido la ĉefreferaĵon prī' la temo, „Vivmaniero en la evoluinta socialisma socio“ prezentis la internacie konata muzikartisto, intendanto de la Ŝtata Operejo, *prof. d-ro Hans Pischner.*

En la plenkunsido kaj en la sep kongresaj laborgrupoj pli ol 120 delegitoj prenis la parolon. La laborgrupoj traktis la spiritan-kulturan vivon en la urbaj kvartaloj, en la kamparaj regionoj, aliaj grupoj traktis pri la pli forta kultura engaĝigo de la juna intelektularo, pri problemoj de la kultura heredaĵo, pri scienco, literaturo kaj arto kaj la kunagado de Kulturligo por la gardo, flegado kaj aranĝado de la natura hommedio. Kompreneble ankaŭ la esperantistoj aktive partoprenis la preparon kaj pasigadon de la kongreso. En la 60-paĝa presita raporto oni povis legi pri ilia agado. Aĉeteblaj en la bazaro estis esperantlingvaj eldonaĵoj de CLE.

Le prezidanto de CLE *Rudi Graetz* estis elektita en la prezidion de la kongreso. Diversaj esperantistoj, inter ili la membroj de CLE kaj prezidantoj de DLE-oj *Ernst Schonert* (Berlin) kaj *Jürgen Hamann* (Leipzig) estis delegitoj de la kongreso. Al la honoraj gastoj el eksterlando apartenis *Nikola Aleksiev*, prezidanto de MEM, kun kiu la membroj de CLE havis multajn utilajn interparolojn.

La kongreso akceptis novajn bazajn taskojn de KL kaj elektis kiel prezidanton *prof. d-ron Hans Pischner.*

Entute la kongreso dominis dum 3 tagoj en la amskomunikiloj de GDR. La kreskinta socia kaj politika signifo de la organizo, kaj per tio ankaŭ de la esperantistoj, estis nepretervidebla.

Ĉiuj suborganizoj, estraroj kaj grupoj de KL pridiskutos la rezultojn de la kongreso tirante la konkludojn por la propra agado. Tio ankaŭ koncernas la esperantistojn.



Parolas la nova prezidanto de Kulturligo de GDR, prof. d-ro Hans Pischner.

Foto: Zentralbild



Forpasis la prezidanto de CLE, Rudi Graetz

Forlasis nin admirinda homo!

Kiam mi havis la taskon prepari la oficialajn aranĝojn kunlige al la 70-a naskiĝtago denia prezidanto Rudi Graetz, mi tion faris kun plej granda ĝojo. Ja mi sciis, ke oni tre digne omaĝos Lin, Lian batal- kaj sukcesplenan, riĉan vivon. Kaj tiel estis. Kiam ni vidis Lin dum sia festotago, plene ĝoja kaj varmkora, superŝutita de honorigoj, tamen ĉiam modesta kaj simpla, Li estis kiel ĉiam vitala kaj plena da planoj. Rudi, vi fariĝos 100 jara, mi tiam diris. Kaj nun . . . Tri monatojn poste mi denove havas taskon prepari, skribi . . . ĉio tre doloriga.

Iujn sciigojn oni ne pretas akcepti kiel verajn, ĉiam denove oni obstine ilin rifuzas. Kiam la duan de oktobro 1977 ni eksciis pri la forpaso, mi estis en tia stato. Ne povas esti, Rudi Graetz ne plu vivas . . . ? Li, tiu homo bonkora kaj milda, patreca amiko, mia kamarado spertoriĉa, Li, nia prezidanto, ne plu estas? Ĝi akre trafis nin ĉiujn, tiu frapego. Kaj nur malrapide ni pli kaj pli plene ekkonscios pri la terureco, pri la perdo. Iuj diris: La du ĝemeloj el GDR kaj celis Rudi kaj min. Ja, ni estis kompleto harmonia.

Ĝi ĉesis bati la unuan de oktobro 1977, la fidela koro de aminda grandanima homo, kies persona ĉarmo profunde tuŝis ĉiun, kiu povis kontakti kaj kunlabori kun Li. Jes, la apero de organizita Esperantomovado en Germana Demokratia Respubliko estas intime kaj nedisigeble ligita al la nomo Rudi Graetz. 12 jarojn li staris ĉe la pinto de la movado, estimata en nia lando kaj trans ĝiaj limoj, estimata ankaŭ de tiuj, kiuj ne agnoskas niajn principojn. Ĉe ĉio, kion ni atingis, Li havis personajn meritojn. Li ne daŭrigis, post pensiuliĝo, profesiajn aktivecojn — kvankam proponite al Li. — por pli bone povi sin dediĉi al la movado.

Sennombraj estas la prelegoj, artikoloj, gviditaj de Li kunsidoj, sennombraj la personaj interparoloj, leteroj, diskutkontribuoj . . . . Nia prezidanto estis altmeritplena aganto kaj socia aktivulo profesie kaj honorofice. Oni estimis lin ankaŭ ekster la movado. Tio gravas kaj helpis. Li estis dotita per granda energio kaj celkonscio kaj ĉiam sciis tre bone, kion oni por kiu celo povas fari kun kiu kiam kaj kie.

Mi havis la feliĉon tre ofte agadi kun Li. Mi dankas multon al Li. Mi neniam vidis lin nervoza aŭ akra en rilatoj kun aliaj homoj. Politike tre klara, sincera amiko de Sovetunio, arda internaciisto, vera komunisto, li ĉiam gardis grandan toleremon kontraŭ alies opinioj sen rezigni eĉ ete pri la propraj principoj. Sed li ankaŭ povis esti rapiddecida kaj tre konsekvenca, se tio necesis, kaj ofte necesis. Lin ĉion interesis. Interlingvistikaj problemoj, metodiko de la instruado, literaturo aŭ lingvaj problemoj, ĉio kaptis lin. Ĉiam malferma kaj akceptema por la novo. Rudi Graetz samtempe estis forte ligita al la revoluciaj tradicioj, tio estis ĉe li ne mekanisma sed tre dialektika rilato.

Al Rudi Graetz, al la prezidanto, tiu modesta homo, ĉiu fidis. Li scipovis aŭskulti aliajn. Kaj se Li donis iun konsilon, tiam nealtrude, preskaŭ heziteme. Kaj ĉiu sciis, ke Li pravis. ———

Ĉu io povas konsoli nin? Mi ĝojas, ke nia prezidanto povis sperti la sukcesan evoluon de nia movado, evoluo, kiu eble ne estas sensacia kaj rapidega, sed principofidela, kontinua, senkriza kaj sekura, tre solida. Ke ĝi estas harmonia, kiel la tuta gvidagado, ni ankaŭ multe dankas al Li. Kaj mi ĝojas, ke Li povis travivi la lastan siaspece unikan Universalan Kongreson en Rejkjaviko, kie li en 1957—1959 profesie agadis. Ĝi fariĝis Lia lasta kongreso. Kaj mi certas, ke ni daŭrigos nian agadon en Lia senco. Tiel ni plej bone honorigos Lian spiritan heredaĵon. Ne, tute ne: Rudi Graetz ne mortis. Li restos inter ni.

Detlev Blanke

*

Kondolencoj el la tuta mondo

El multaj landoj Centran Laborrondon atingis vere kortuŝaj kondolencaj telegramoj kaj leteroj okaze de la forpaso de Rudi Graetz, prezidinto de CLE.

Malnova amiko de Rudi Graetz, elstara aganto de la pola Esperanto-movado, Jerzy Uspienski el Varsovio, trovis tre belajn vortojn, kiuj tre trafe priskribas la personecon de la elmondiĝinto.

Ni represas parton el tiu letero:

„ . . . Granda perdo por la movado ne nur vialanda, sed ankaŭ por la internacia kaj speciale tiu en la socialisma landaro.

Tiu fakto estas por mi des pli nekredebla, ĉar apenaŭ antaŭ kelkaj monatoj mi adiaŭis Lin lastfoje en gaja amika societo en Gdansko, kie Li bone amuziĝis kun diversgeneraciaj samideanoj kiel ĉiam bonkora, gaja, spirite kaj mense juna. Kaj jam Li ne plu estas inter ni! Granda, doloriga perdo por ĉiuj, kiuj Lin konis.

Certe Vi pli multe scias pri Liaj grandaj meritoj por renaskiĝo kaj ekfloro de Esperanto-Movado en la Demokratia Germanujo, pri Lia

profunda fideleco al la ideo de la internacia lingvo kiel grava instrumento de internaciismo kaj progreso. Estis la fideleco, kiun ne povis detrui persekutoj de faŝisma teroro nek pli postaj miskomprenoj. Permesu do al mi aldoni nur kelkajn personajn vortojn pri Rudi, kiun mi havis honoron kaj ĝojon koni kiel germanan amikon. Mi emas paroli persone, ĉar tute persone mi sentas Lian forpason.

Dum dek kelkaj jaroj, ekde kiam la esperantistoj de GDR ekaktivis en la internacia E-movado mi plurfoje kontaktis kaj kunlaboris kun k-do Rudi Graetz. Ĉiam estis io admirinda kaj lerninda ĉe Li.

Dum la prelegoj kaj renkontiĝoj, kiujn ni organizis al Li en Pollando, dum la Kongresoj de UEA kaj dum la Interkonsultiĝaj konferencoj de la gvidantoj de E-organizaĵoj en socialismaj landoj. En ĉiuj ĉi tiaj laborkontaktoj mi ĝuis la belan, maloftan kaj eĉ enviindan agad-stilon de Rudi. Estante longjara kaj eminenta soci-politika aganto, kun duonjarcenta sperto de batalanto por progreso, paco kaj socialismo, Rudi Graetz neniam, eĉ ne per eta signo aŭ vorto demontris sian superecon teorian kaj pratikan. Certe ĉiu, kiu Lin renkontis, devis esti impresita per la modesteco, mildeco, delikateco, bonhumoro radiantaj ĉiam de ĉi tiu Homo. Tiuj ecoj ne povis ne veki simpation al Li, eĉ flanke de personoj tute ne proksimaj ideologie. Kaj nur poste, ĉe kunlaboro oni povis admiri Lian trankvilan saĝon, viglan imagon, komprenemon pri alies vidpunktoj, sed samtempe principecon ĉe traktado kaj solvado de aferoj. Li neniam predikis, proklamis aŭ instruis — nur komprenigadis, milde kaj trankvile, sed trafe kaj argumentite. Tiuj ĉi trajtoj animaj kaj mensaj ne estas tro oftaj. Tial mi nomis ilin enviindaj kaj — lerninda j . . .

Tia do estas, per plej kurtaj vortoj, kaj tia restos en mia animimago la karmemora — jam bedaŭrinde! — pli aĝa amiko germana Rudi Graetz. Mi rajtas Lin tiel nomi, ĉar li tiele nomis min kaj ĉiam, ĉe ĉiu nemalofta renkonto Li trovis ĝustan geston aŭ vorton por tiun amikecon demonstri. Kaj mi aprezas tion tute speciale, ĉar ĝi estis sincera amikecosento de polo kaj germano, bazita sur la vera internaciismo kaj ebligita per Esperanto . . .

Jerzy Uśpienski
Varsovio

★

DANKON PRO LA KONDOLENCOJ

Multaj enlandaj kaj eksterlandaj esperantistoj, landaj asocioj kaj reprezentantoj de Esperanto-organizaĵoj, kondolencis pro la forpaso de nia prezidanto de Centra Laborrondo, la amiko, kamarado, patro kaj edzo Rudi Graetz.

Pro iliaj kortuŝaj signoj de kunsento ni tre sincere dankas.

Centra Laborrondo Esperanto
en Kulturligo de GDR
D-ro Detlev Blanke
sekretario

Wally Graetz
kaj familio



UNESKO kaj Esperanto en Rejkjaviko

La 62-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta de la 30-a de julio ĝis 6-a de aŭgusto 1977 en Rejkjaviko/Islando, ne nur „plej nordis" sed ankaŭ kalkuliĝos al la plej gravaj el la historio de la Esperanto-movado. La malgranda sed mirinde aktiva kaj sindona kongresa komitato sukcesis organizi perfektan kongreson, kiun partoprenis, neatendite, 1 200 kongresanoj el 41 landoj. Inter ili estis Rudi Graetz (†) kaj d-ro Detlev Blanke kiel reprezentantoj de CLE. Iu diris, ke sekve 0,5 % de la homoj estantaj en Islando (200 000) dum unu semajno parolis la internacian lingvon, dum unu semajno plena da rimarkindaj eventoj.

Ĉeestas la Ĝenerala Direktoro de UNESKO

En 1945 UNESKO per rezolucio aprezis la kulturan valoron de Esperanto kaj ebligis la vojon al konsultoj rilatoj kun UEA. 1977 la plej alta reprezentanto de tiu speciala organizo de UN, la *Ĝenerala Direktoro de UNESKO*, s-ro Amadou-Mahtar M'Bow, persone ĉeestis la matenan kongresan inaŭguron (31. 7. 77) kaj faris gravan paroladon pri problemoj de komunikado. La parolado estis franclingva, ĉiu kongresano disponis pri la Esperanta traduko. (Eltirojn el lia parolado ni publikigos en „d.e. 1/78). Tiu simptoma paŝo de UNESKO ilustras la grave kreskintan internacian prestiĝon de la Esperanto-movado, la plikonsciiĝon pri la monda lingvoproblemo kaj pri ebla solvo pere de planlingvo.

La inaŭguron plue ĉeestis la ŝtatprezidanto de Islando, *d-ro Kristjan Eldjàrn*, ministroj de Islando kaj anoj de la diplomatiaj reprezentejoj, i.a. la ambasadoro de USSR kaj la aferŝarĝito de GDR, *s-ro Spitzl.*

Tonkin: Ni estas sur ĝusta vojo

Dum la posttagmeza malfermo la prezidanto de UEA, *d-ro Tonkin*, en sia parolado taksis la rilatojn inter UEA kaj UNESKO kaj i.a. diris:

„Tra la tuta historio de Esperanto, eĉ en la tagoj de plej proksimaj kontaktoj kun la Ligo de Nacioj, kiam la Internacia Lingvo preskaŭ atingis oficialajn rekonon kaj utiligon, neniam aperis ĉe unu el niaj

Universalaj Kongresoj la ĉefa funkciulo de granda internacia registara organizo. En tiu senco la alveno al la Kongreso ĉi-jare de la ĝenerala direktoro de UNESKO, s-ro M'Bow, estas epokfara. Ĝi estas la rezulto de zorga antaŭpreparo — tri jaroj da intensa agado ĉe UNESKO, kaj, tute speciale, interveno en la laboron de UNESKO je ĉiuj stadioj, ne nur pri internacia kunlaboro sed ankaŭ, kaj antaŭ ĉio, pri diskriminacio — pri la neceso krei internacian kunlaboron en spirito de egaleco. Jen la ŝlosila kunligo inter la du aspektoj de Esperanto: Estas vaste kredate, ke egaleco inter la popoloj estas antaŭkondiĉo de efika kunlaboro. Sur la lingva kampo, Esperanto prezentas vojon al tiu egaleco, iasence ĝin simbolas.

Kaj ĉar ni kuraĝe kaj larĝmense prezentis nian vidpunkton al UNESKO per oftaj intervenoj, komentarioj pri ĝia agado, ktp. UNESKO siavice-surbaze de tiu esenca antaŭpreparo en Montevideo en 1954 — propra-iniciate moviĝis por esplori kun ni tiun vidpunkton kaj por ekzameni de proksime la pretendojn kaj meritojn de Esperanto. Karaj gekolegoj, ni estas sur la ĝusta vojo. Esperanto engaĝiĝis kun la fluo de la eventoj kaj trovis sian strategion.

Se tiu ĉi estas momento por jubili pri laboro bone plenumita, se la vere impona esprimiĝo de bona volo flanke de nia gastiganta ŝtato kaj nia plej proksima internacia registara organizo levas niajn korojn kaj donas al ni novajn inspiron kaj kuraĝon, ni estu dankaj. Sed tiu ĉi kunsido, en kiu ni pensas pri la pasinta periodo, pri la nuna stato de Esperanto kaj pri la estonta vojo, estu ankaŭ okazo por klarvida kaj sobra pritakso de niaj fortoj kaj mankoj.

Gravegas, ke ni estu pretaj

Malgraŭ tio, ke la unua interesiĝo pri la Internacia Lingvo fare de internaciaj organizoj estas rezulto de nia preparlaboro, tamen ni devas rekoni, ke la Esperanto-movado neniel regas, nek povas regi, la mondajn eventojn. Kvankam ni povas iel influi, iel persvadi, tamen ne estas ni, kiuj povas decidi kiam en difinita organizo la lingva problemo transiros la sojlon de netolereblo; ne estas ni, kiuj sendepende decidas kiam la lingva diskriminacio fariĝu brula demando en tiu aŭ alia tereno aŭ mondparto. Ni povas utiligi la eventojn (se ni estas pretaj) sed ni ne povas regi ilin.

Pro tio, gravegas, ke ni estu pretaj kapti ĉiujn okazojn, kiam ili prezentiĝos — kaj ekspluati ĉiujn okazojn daŭre, sisteme kaj konsekvence." Dum tiu posttagmezo la reprezentantoj de landaj asocioj salutis la kongreson, por CLE *Rudi Graetz.*

La rajto je komunikado

Plua karakteriza trajto de la kongreso estis, ke ĝi traktis gravan problemon, pri kiu lastatempe ekokupiĝis UNESKO: la rajto je komunikado. La kompleksan temon, havanta politikan, ekonomian, kulturan, lingvan kaj aliajn komplikajn aspektojn, oni traktis dum diversaj kunsidoj kaj seminarioj. Dum la dua ĝenerala kunsido en la podio diskutis *d-roj Corsetti, Tonkin, Lins, Pool, Profesoro Kameŝkov* el Leningrado,

krome la *s-roj Isaksson* (sekretario de la Islanda UNESKO-komisiono) kaj *Sussman.* Specialan podian diskuton pri la temo por la islanda publiko partoprenis kiel podianoj *d-roj H. Tonkin, D. Blanke, mag. P. Daŝgupto (Hindio)* kaj tri lektoroj de la islanda universitato. Ĝi estis la sola kunveno kun simultantradukistoj kaj certe tre impresis la islandajn personecojn, kiuj partoprenis. Ĉiuj diskutoj pri la kongrestemo evidentigis, ke la realigo de la rajto je komunikado estas unuavice determinata per politikaj-ekonomiaj faktoroj. Baza kondiĉo, cetere, por solvo de la mondvastaj problemoj de komunikado, tiel estas substrekite, estas *paco* kaj malstreĉiĝo laŭ la rekomendoj de la Fina Akto de Helsinki. Krome oni akcentis, ke la funkcianta planlingvo Esperanto kaj ĝia movado liveras taŭgan modelon por studi samrajtan internacian *lingvan* komunikadon en eksteresperantistaj medioj ĝenerale ne sperteblan. Tiun modelon UNESKO povas studi, kaj UEA siavice pretas disponigi al UNESKO la spertojn kolektitajn dum la 90 jara funkciado de la Internacia Lingvo.

Alta scienca nivelo: ISU kaj CED

La 30-a serio de la Internacia Somera Universitato (ISU) kiun rektoris la islanda filologo *A. Bödvarsson,* prezentis altnivelan lekciaron: *mag. W. Auld* (Britio) „La rolo de originala literaturo en la historio de Esperanto", *d-ro D. Blanke* (GDR) „Konfronta komparo de planlingvo kaj etnolingvo", *mag. A. Bödvarsson* (Islando) „Lingva akiro ĉe infanoj", *mag. P. Daŝgupto* (Hinda Unio) „Stato kaj influo de la angla lingvo en Hinda Unio", *prof. H. Frank* (FRG) „Lernfacilecgradoj de diversaj fremdlingvoj", *prof. S. Kawamura* (Japanio) „Lingva problemo en kemia komunikado", *d-ro E. J. Liebermann* (USONO) „La rajto devo kaj hezito komuniki pri la sekso", *prof. J. Pool* (USONO) „Ĉu komunikrajtoj povas esti egalaj?", *prof. C. Støp-Böwitz* (Norvegio) „Komunikiĝo inter bestoj".

Krome en speciala kolokvo *prof. Frank* kaj liaj kunlaborantoj (FRG) informis pri problemoj de klerigteknologio lige al la uzo de planlingvo. *Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED),* kies estraron formas *d-roj Pool, Lins kaj Blanke,* informis pri faratajoj kaj planoj. La revuo „La Monda Lingvo-Problemo" (ekde 1969 — 1977 aperis 18 kajeroj) novtitoliĝos ekde la 19-a kajero „Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado". Estas presata la lekciaro de *d-ro J. Wells* (61-a UK 1976 en Atheno) „Lingvistikaj aspektoj de Esperanto". En preparo troviĝas „Bibliografio de planlingvaj vortarojn. *(M. Ĝivoje kaj E. Ockay).*

Daŭras la klopodoj revivigi la revuon „Esperantologio". Plue progresas la ĉefredaktorata de *Ulrich Lins* „Enciklopedio de Esperanto" (dua eldono). U. Lins ankaŭ eldonas „Novajleteron por interlingvistoj",de kiu ĝis nun aperis 3 numeroj. En la revuo „Esperanto" de UEA reaperos rubriko „CED-informoj", kiu daŭre informados pri la agado de CED kaj pri sciencaj aspektoj de la interlingvistika problemaro ĝenerale kaj speciale pri esperantologio. Grandan intereson trovis la propono, esperantigi la sovetan verkon „Problemoj de interlingvistiko".

Por la 63-a UK 1978 en Varna estas planata esperantologia konferenco, pri kies programo okupiĝos *D. Blanke.*

Kontraŭ la neŭtrona bombo

La publika kunveno de MEM estis dediĉita al la temo „Realigo de la Fina Akto de Helsinki". La prezidanto de MEM, Nikola Aleksiev, analizis la internacian situacion kaj substrekis, ke la proceso de malstreĉiĝo montris sukcesojn, kiujn oni devas nepre konservi kaj plifirmigi. Granda danĝero estas la pliintensiĝo de la vetarmado, kaj necesas ĉion entrepreni, por ke la politikan malstreĉiĝon sekvu la militkoncerna. Precipe necesas malebligi la daŭrigon de la vetarmado kaj la produktadon de la projektita en Usono neŭtrona bombo, kiu evidente estas konceptita kiel agresa armilo. Plue *s-ro Lech Kośieniak* informis pri la rezultoj de la Asembleo de packonstruantoj, okazinta en majo 1977 en Varsovio, kiun partoprenis ankaŭ delegacio de MEM (kp. „der esperantist" 5/77, p. 5). Post diskuto, kiun ankaŭ partoprenis Rudi Graetz pri la problemoj de la vetarmado, la kunveno akceptis rezolucion.

Kleriga programo kaj fakkunvenoj

Ekevoluas klopodoj promesplenaj enkonduki en la kongresojn iun klerigan programon. Ĉijare *mag. W. Auld* gvidis progresigan kurson, *s-ino Haudebine* el Francio prezentis Cseh-seminarion (la rekta metodo de Esperanto-instruado laŭ Andreo Cseh). Krome formiĝis konversacio rondo, kaj ne mankis intereso por la kvizo, gvidita de *L. Beaucaire*. Unuafoje estis aranĝita „tujkurso" por la kongreslanda lingvo, t.e. la islanda. Verŝajne la kongreso en Rejkjaviko apartenas al la plej programerhavaj. Entute oni povis (se oni povis) elekti inter 148 aranĝoj (!!) dum unu semajno. De graveco ankaŭ, kompreneble, estis la multaj fakaj kunvenoj, inter ili: Akademio de Esperanto, matematikistoj, sciencistoj, fervojistoj, instruistoj, militrezistantoj, monda turismo k.a.

Riĉa kultura programo

Ankaŭ en Rejkjaviko la kultura kongresprogramo estis vere elstara. La nacia islanda teatro prezentis la islandan teatraĵon „Inuk" ,kiu fariĝis grandaga sukceso pro interesa enhavo kaj modela prezento. La pola teatro A. Grabowski kun la aktoroj *Kalina Pienkiewicz* kaj *Zbigniew Dobrzynski* surscenigis novan spektaklon „La hipnoto" de A. Cwojdzinski. Krome zorgis por artaj ĝuoj la Internacia Arta Vespero, la Islanda vespero kaj diversaj filmprezentadoj (i.a. kun la GDR-filmo „Nia lando"). *Triksini,* la pupteatristo, ludis „la butikista korbo" laŭ Hans Sachs.

Diversaj duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj ĉe belega, por Islando tute ne nepre kutima, vetero donis fortajn impresojn pri la unike ĉarma norda lando el fajro, akvo kaj glacio.

Nova estraro de UEA

1977 estis la jaro de la elektoj. La nova komitato nun konsistas el 70 membroj. Oni elektis C-komitatanojn (pro fakaj meritoj), inter ili *d-ron Detlev Blake* el GDR. *D-ro Tonkin* estis elektita nova prezidanto de UEA, kaj tio per 47 el 48 voĉoj! Al la nova estraro krome apartenas la vicprezidantoj *prof. Carl Støp-Böwitz* (Norvegio), *mag. William Auld* (Britio), la ĝenerala sekretario *d-ro Werner Bormann* (FRG) kaj la

membroj *Ursula Gratapaglia* (Brazilio), *Gregoire Maertens* (Belgio), *d-rino Flora Szabo-Felsö* (Hungario) kaj *Andrzej Pettyn* (Pollando).

Ek al Varna 1978

La kongreso estis vere tre sukcesa kaj rava. Tion i.a. atingis UEA pro la ĝusta programkoncepto, la nelacigebla LKK sub prezido de la poeto *Baldur Ragnarsson,* la engaĝita kongresanaro kaj, ne laste, pro la ĉarmaj rejkjavikanoj kaj la escepte bela vetero, kiu trempis la subnordpolusan insulon en kolorriĉajn kontrastojn.

Finiĝis la 62-a. La prezidanto de la Loka Kongresa Komitato por la 63-a, s-ro Nikola Aleksiev, simbole transprenis la kongresflagon. Ek al Varna, en la sudan Bulgarion.

D. Blanke

★

Rezolucio
de la 62a Universala Kongreso

La partoprenantoj en la 62-a Universala Kongreso de Esperanto, kunvenintaj de la 30a de julio ĝis la 6a de aŭgusto 1977 en Rejkjaviko ***(Islando),***

— ***konstatante*** kun kontento la iniciaton de Unesko esplori la kompleksan problemaron de la „rajto ĵe komunikado“,

— *esprimante* sian esperon pri pluaj progresoj en la realigo de la Fina Akto de Helsinki, speciale sur la kampo de samrajta internacia komunikado;

— *aŭskultinte* kun granda interesiĝo la gravan paroladon de la ĝenerala direktoro de Unesko s-ro Amadou Mahtar M'Bow, dum la Inaŭguro de la Kongreso, pri la menciita temo;

— *substrekante* la gravecon de la lingva aspekto de la komunikado, speciale en internaciaj rilatoj, aspekto ĝenerale ne sufiĉe atentata;

— *avertante* pri la faktoj, ke en la hodiaŭa mondo centoj da lingvoj kaj ties kulturoj estas minacataj de estingiĝo pro diskriminaciaj komuniksituacioj;

— *diskutinte* en pluraj aranĝoj dum la Kongreso la diversajn aspektojn de la komunikado, speciale la lingvajn barojn al la plena efiko de la rajto je komunikado:

proponas al la landaj Esperanto-asocioj:

— daŭre atenti pri la celoj kaj agadoj de Unesko, precipe sur la kampo de internaciaj kulturaj interŝanĝoj;

— speciale okupiĝi pri la rajto je komunikado, en kunlaboro kun la landaj Unesko-komisionoj;

— montri, per konkreta internacia kultura agado, responda al la celoj de Unesko kaj al tiuj de UEA, la utilon de la Internacia Lingvo por samrajta internacia komunikado;

komisias al la Estraro de UEA:

— per taŭgaj dokumentoj ***informi*** pri la rezultoj de la pritraktado de la kongresa temo Unesko-n, ties ŝtatoj membrojn, la ĝeneralan

sekretarion de UN kaj la ŝtatojn subskribintajn la Finan Akton de Helsinki;

- *esprimi* al Unesko la urĝan senton de la esperantistaro pri la neceso pli profunde esplori la lingvan aspekton de la rajto je komunikado kaj la rolon de internacia lingvo en la evoluigo de nova monda komunik-ordo;
- *proponi* la helpon de UEA kaj ĝiaj specialaj organoj en tiu esplorado.

★

D E K L A R O

de la MEM-kunveno dum la Universala Kongreso en Rejkjaviko

La kunvenintaj kongresanoj el diversaj landoj, aŭdinte enkondukan paroladon de la prezidanto de MEM pri la realigo de la Helsinkia „Fina Akto" kaj post okazintaj debatoj,

deklaras:

1–e: La Fina Akto, aprobita de la gvidantoj de 33 eŭropaj landoj, Usono kaj Kanado, en Helsinki en 1975-a jaro havas grandan signifon por la evoluado de la interrilatoj inter ŝtatoj kun malsamaj sociaj sistemoj surbaze de paca kunekzistado, reciproka sekureco kaj aktiva kunlaborado. Ĝia signifo ne limiĝas nur por Eŭropa kontinento, sed valoras por la tuta mondo.

2–e: Por normala evoluo de la Esperanto-movado, enlande kaj internacie, estas tre necesa konstanta malstreĉeco en la internaciaj rilatoj kaj forigo de la militminaco.

3–e: La esperantistaro subtenas la pluan realigon de la principoj entenataj de la Fina Akto de Tuteŭropa konferenco por sekureco kaj kunlaborado en Helsinki (1975) en ties fundamentaj fakoj- politika, ekonomia kaj kultura, ĉar ili estas tre intime kaj nedisigeble ligitaj.

4–e: Tiurilate plej grava tasko estas ĉesigo de la vetarmado kaj la sistema malgrandigo kaj posta likvido de la stoko da armiloj, precipe da amasmortigiloj.

5–e: La esperantistoj devas subteni la protestan kampanjon de Monda Packonsilio kontraŭ la produktado de t.n. „neŭtrona bombo", kiu estas reklamata kiel humana armilo, ĉar ĝi estos mortiganta nur la homojn konservante la konstruaĵojn.

6–e: La esperantistaro devas subteni la kunvokon de speciala sekcio de Unuiĝintaj Nacioj por malarmado kaj ĉiujn klopodojn por fakta kaj reala transformigo de la internacia malstreĉiĝo en daŭran universalan fenomenon, por ke neniam la mondo revenu la la periodo de la „malvarma milito".

La kunvenintoj esperas, ke la politika realismo venkos en la interŝtataj rilatoj, ĉar malstreĉeco estas absolute necesa por la progreso, kulturo kaj paco en la interesoj de la tuta Homaro.

Por la kunvenintoj
I. Kutas
prezidanto de la kunveno.

Rejkjaviko, la 2-an de aŭgusto 1977

Intervjuo kun Romesh Chandra

Dum la tempo de 10. — 12. 9. 1977 en Berlin (GDR) okazis grava konferenco de la Buroo de la Monda Packonsilantaro. D-ro Detlev Blanke, membro de la Internacia Komitato de MEM kaj sekretario de la MEM-Komitato de GDR, partoprenis kiel gasto kaj havis la eblecon intervjui la prezidanton de la Monda Packonsilantaro, s-ron Romesh Chandra.

Jen la intervjuo.

Demando: La Monda Pacmovado kaj la Monda Packonsilantaro pli kaj pli gajnas internacian signifon kaj politikan pezon en la batalo por paco kaj sekureco. Kio karakterizas ilian nuntempan evoluon?

R. Chandra: Mi opinias, ke post la Monda Asembleo de la Packonstruantoj en Varsovio la Monda Packonsilantaro atingis novan etapon. La tuta Asembleo montris, ke la Monda Pacmovado nuntempe okupiĝas tutlarĝe pri la homaj pacinteresoj. Ni hodiaŭ povas diri, ke la Monda Packonsilantaro aktuale okupiĝas pri ĉiu demando, pri kiu okupiĝas la Unuiĝintaj Nacioj, kaj, mi ŝatus diri, eĉ pli la Monda Packonsilantaro traktas ĉiun problemon, kiu rekte rilatas ĉiun viron aŭ virinon ĉie sur la mondo.

Demando: Nia ĉefa celo estas krei amasan movadon, kiu faras la malstreĉiĝo-proceson nenuligebla kaj blokas la klopodojn de tiuj fortoj, kiuj, strebante al obstaklado de la malstreĉiĝo, volas reveni al la malvarma milito. Antaŭ ĉio necesas amasa movado por la ĉesigo de la vetarmado. Plej lastatempe la kampanjo kontraŭ la neŭtrona bombo atingis grandan amplekson, kompare al aliaj agadoj rilate al unuopaj aspektoj de la vetarmado. Kaj tiu kampanjo ekkaptis kaj estonte ekkaptos ĉiam pli da homoj por solvi la kerntaskon, fari la malstreĉiĝon universala proceso. **Demando:** Kiuj ĉefaj taskoj staras antaŭ la Monda Packonsilantaro por la sekvonta tempo?

R. Chandra: La Monda Packonsilantaro fiksis en sia programo vicon da taskoj okupiĝantaj ĉefrange pri la vetarmado. Sed ankaŭ temas pri

tiaj problemoj kiel evoluado kaj sendependeco, batalo por la homaj rajtoj, la rajtoj de ĉiuj popoloj batali por la ĉesigo de la koloniismo — kiel en Afriko —, la batalo por la forigo de la fokusoj de militdanĝeroj, plue grandaj solidaraj agadoj por Ĉilio, Urugvajo, Brazilio, Paragvajo kaj aliaj landoj, por la viktimoj de la faŝismo kaj neofaŝismo. Mi kredas, ke ni prave povas diri, la Monda Packonsilantaro estas nuntempe la plej granda internacia solidareca movado.

Demando: Kiujn eblecojn vi vidos, ankoraŭ pli forte utiligi la multajn internaciajn rilatojn kaj kapablojn de la esperantista pacmovado por la mondvasta batalo por paco, sekureco kaj malstreĉiĝo?

R. Chandra: Mi kredas, ke la esperantista pacmovado jam ludas tre gravan rolon kunigante ĉiujn kiuj sin engaĝas por paco kaj por Esperanto. Tio estas iel tute natura. Ekzistas la neceso reciproke interkompreniĝi. Kaj, se vi pro tio diras „Esperanto por la paco", mi kredas, ke vi mencias du vortojn, kiuj konsiderinde signifas la saman.

Demando: 1973 vi subskribis en la nomo de la Monda Packonsilantaro en Moskvo deklaron pri kunlaboro kun la Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Kiel vi prijuĝas la ĝisnunan kunagadon de MEM ĉe la realigado de la taskoj de la Monda Packonsilantaro?

Kiujn eblecojn vi vidas por plua pliprofundigo de la kunlaborado inter ambaŭ organizaĵoj, en la intereso de mondvasta pacbatalo?

R. Chandra: Mi estas tre fiera, ke ni povis subskribi la komunan interkonsenton kun MEM kaj mi kredas. ke ni povis realigi ĝin dum la jaroj en la spirito de vera kunlaboro. Ni ĝojas pri la partopreno de reprezentantoj de MEM en la laboro de la Monda Packonsilantaro, ĉe ĉiuj aktivecoj sur ĉiuj interesataj kampoj. Kaj ni aŭdis ĝoje pri MEM-aktivecoj, kiuj plifortigas nin kaj utilas al ni. Mi kredas, ke en la nuntempa situacio devas kunveni kaj intime kunlabori ĉiuj neregistaraj organizaĵoj laborantaj por la paco. Kaj mi persone esperas, ke ni tre baldaŭ havos eblecon por plia duflanka renkontiĝo kun la gvidantaro de MEM, por pritrakti komune la ambaŭflankan laboron, laboron por kiu ni deziras ĉion bonan.

Intervjuis d-ro Detlev Blanke, Berlin

Ni konsilas larĝan represon de la intervjuo, eble kune kun taŭga foto de Romesh Chandra.
Estas necese sendi 2 ekzemplerojn de la publikigita intervjuo al Monda Packonsilantaro
s-ro Romesh Chandra, prezidanto
s-ro Fritz Rathig, sekretario
Informationszentrum d. WFR, Helsinki, PO Box 18114, Finnland
La interparolo kun s-ro Chandra kaj kun aliaj reprezentantoj de la

MPK klare montris grandan simpation por nia MEM-agado. Oni volonte ricevos diverslingvajn deklarojn kontraŭ la neŭtrona bombo kaj pri aliaj aktualaj problemoj, pri kiuj okupiĝas MPK. Kompreneble estus utile, aldoni por MPK tradukon en iu el la lingvoj franca, angla germana. Ekzistas eblecoj, ke la „Kuriero de la paco", eldonata ĉe MPK en kelkaj lingvoj represos informojn pri la konkretaj porpacaj aktivecoj de MEM. Ankaŭ fotoj estas bonvenaj.

La anglalingva originala sonbendo troviĝas ĉe la intervjuinto:
D-ro Detlev Blanke, DDR–1058 Berlin, Wolliner Str. 13/14.

★

Esperanto en Radio

Varsovio. *Dum la jaro 1976 la Esperanto-redakcion de Pola Radio atingis 5 777 korespondaĵoj de aŭskultantoj. Tio estas kompare al la jaro 1975 kresko de ĉ. 500 korespondaĵoj.*

Je la pinto de la jara statistiko staras jenaj dek landoj:

Sovetunio 1 275; Germana Demokratia Respubliko 1 065; Ĉeĥoslovakio 765; Federacia Respubliko Germanujo 604; Hungario 462; Francio 438; Britujo 409; Finnlando 191; Nederlando 191; Italujo 80.

(Pilo-Press 3/77)

★

Japana kuracisto serĉas amikojn en GDR

Japana kuracisto, 32 jara, internisto, interesiĝas pri la socialmedicina sistemo de GDR kaj speciale studas hipertension kaj apopleksion. Li deziras viziti GDR. *S-ro Tezuro Kawanisi* estas aktiva MEM-aktivulo. Interesuloj skribu al: Tezuro Kawanisi, 27–31 KJO-Mati-Kanazawa-si Isikawa-ken, Japanio

★

TEJO-Kongreß in Tarnovo!

Der 34. Internationale Jugendkongreß der Esperantisten findet vom 22. – 29. 7. 1978 in Veliko-Tarnovo/Bulgarien statt.

Jugendtourist bietet eine organisierte Kongreßfahrt (Flug) für ca. 900 M an. Interessenten müssen sich umgehend beim ZAK Esperanto (108 Berlin, Charlottenstraße 60) melden.

Gasto el la lando de l' Ruĝa Oktobro

Profesoro S. N. Podkaminer en GDR

De la 17-a de oktobro ĝis la 5-a de novembro 1977 en GDR restadis bona amiko de nia popolo kaj esperantistaro: prof. S. N. Podkaminer el Leningrado.

La esperantistoj de GDR salutis en li la multmeritan veteranon de la partrolanda milito, la plej elstaran veteranon de la Sovetunia Esperanto-movado, la senlacan pacbatalanton. Prof. Podkaminer partoprenis kiel kolonelo la 900-tagan defendadon de Leningrado kaj estis membro de la Soveta Militara Administracio 1945/1946 en Germanio (Saksio). Unuafoje li vizitis GDR en 1967 okaze de esperantista Konferenco en Rostock (kp. „der esperantist" 14—16).

Post 10 jaroj, en la jubilea jaro de la Ruĝa Oktobro, nia gasto povis rigardi la grandan evoluon, kiun faris GDR kaj ĝia loĝantaro. En emocia maniero, li, la kundefendinto de Leningrad, parolis antaŭ la partia organizaĵo de la ĉefa sekretariejo de KL en Berlin pri tiu malfacila 900-taga blokado, en kiu sin pruviĝis veraj herooj la leningradanoj, harditaj per la ideoj de la Oktobra Revolucio. Lian esperantlingvan paroladon tradukis d-ro Detlev Blanke. En Rostock, Dresden kaj Berlin la kara gasto havis multajn amikojn renkontiĝojn kaj valorajn interparolojn. Li krome elpaŝis dum renkontiĝoj en Rostock (22. 10. 77), Pirna (29. 10. 77) kaj Berlin (1. 11. 77).

Du gravaj kontribuoj „Lenin kaj Esperanto" („d.e." n-ro 42) kaj „Socialismo kaj internacia lingvo" („d.e." 3/77)), GDR-Paco 77 montras la viglan teorian agadon de S. N. Podkaminer. Ni deziras al la soveta amiko pluajn sukcesojn.

*

Perspektivoj de la junulara movado

La 33-a Internacia Junulara Kongreso okazis de la 9-a ĝis 16-a de aŭgusto 1977 en la franca universitata urbo Poitiers.

350 gejunuloj el 24 landoj, inter ili Jürgen Hamann el GDR, diskutis diversajn aspektojn de la ĉefa temo „Perspektivoj por junulara movado". Funkciis diversaj diskutgrupoj de junularo kaj malarmado, (gvidis Jürgen Hamann) hommedio aŭ pri la landaj junularaj organizoj, junulaj teatrotrupoj ĝis al varbado.

Vaste uzita por la diskutgrupo pri malarmado estas la GDR-eldono de „Paco" 1977.

La komitatanoj de TEJO elektis novan estraron. Prezidanto fariĝis d-ro Savas Tsiturides (Grekio). Krome la kongreso akceptis novan statuton de TEJO kaj kongresrezolucion, kiu resumas la rezultojn de la kongresaj laboroj.

Interlingvistiko en universitato

Prelegserio en Humboldt-Universitato

Unuafoje en sia historio Humboldt-Universitato en Berlin (GDR) oficiale enprogramigis prelegserion „Planlingvoj“ por la aŭtuna semestro 1977. Instrukomisiito por la temo estas nomumita d-ro Blanke, kiu 1976 ĉe al sama universitato doktoriĝis pri komparesperantologia temo (kp. „d.e.“4—6/1976). La prelegserio konsistas el 15 unuhoraj prelegoj, kiuj estas devigaj por ĉ. 50 studentoj de germana kaj angla filologioj. Inter ili estas studentoj el USSR, Bulgario, ČSSR, Pollando kaj Finnlando.

En la menciita serio d-ro Blanke traktas jenajn temojn:

Internacia lingva komunikado-problemoj kaj evolutendencoj; informado kaj dokumentado kaj la lingva problemo; kiel aspektu planlingvo? Kriterioj, klasifiko de planlingvoj (projektoj); Esperanto-lingvaj karakterizaĵoj; Esperanto-vortfarado; planlingvoj en praktiko (Volapuko, Ido, Interlingve, Interlingua, Esperanto) la internacia Esperanto-movado — mikromodelo de internaciaj sociaj strukturoj; pri la scienca valoro de la okupiĝo pri planlingvoj; esperantologio; interlingvistiko; lingvoscienco kaj planlingvoj.

Ĉiu studento ricevis la titolaron de la prelegserio kun problemindikoj kaj baza literaturo.

*

Interlingvistika kurso en Sovetunio

Dum la printempa semestro 1977 Boris Kolker el Ufa, USSR, gvidis interlingvistikan kurson ĉe la Baŝkira ŝtata Universitato, Ufa. La kurso konsistis el 50 horoj kaj estis deviga por iuj studentoj. Dum junio okazis ekzamenoj, kiujn partoprenis 19 kandidatoj.

*

„Trigroŝa Romano“ aperis

Jen, post „Nuda inter lupoj“ de Bruno Apitz en GDR aperis la dua elstara romano en la Esperanta traduko de d-ro Karl Schulze:

La „Trigroŝa Romano“ de Bert Brecht.

La 400 paĝa romano (por GDR 15 markoj) estas en GDR mendebla per la lokaj libro-vendejoj aŭ rekte ĉe Edition Leipzig, 701 Leipzig, Postfach 340.

Esperantistoj el socialismaj landoj mendu pere de siaj asocioj aŭ internaciaj librovendejoj (mendo-numero de la romano: 592 5234).

Esperantistoj el nesocialismaj landoj nur povas mendi la romanon ĉe Bleicher-Verlag en Federacia Respubliko Germanio.

Esperantlingvaj prospektoj estas haveblaj ĉe CLE grandkvante.

„Scienca Revuo" – valora periodaĵo

La gvida scienca periodaĵo esperantlingva estas sendube „Scienca Revuo", redaktata de prof. Boĵidar Popoviĉ el Zagrebo/Jugoslavio. La revuo publikigas originalajn sciencajn materialojn pri plej diversaj disciplinoj kaj sciencaj branĉoj. Ĝi estas nepre necesa por ĉiu science aktiva esperantisto, i. a. pro la terminologiaj problemoj en la unuopaj sciencoj.

Ekde 1977 la revuo ankaŭ estas havebla en GDR kaj kostas 48 markojn. La 6 numeroj jare ampleksas kune ĉ. 250 paĝojn.

Jen superrigardo pri la enhavo de la jarkolektoj 1975 kaj 1976:

Anatomio: Ekzempleroj de la kompara anatomio; La homa korpo kompare kun la korpoj de aliaj maniuloj / **Antropocendogio** – scienco pri protektado de la naturo / **Arkeologio:** Disko de Fajstos / **Astronomio:** Nomlisto de la konstelacioj; Pripensoj kaj demandoj pri la gravito; Pri la direktoj de la perihelioj de kometoj / **Biologio:** Specioj-dunloj de triĉineloj en Kazaĥstano kaj Mez-Azio; La signifo de Kunbrikoj por fekundeco de grundo kaj ilia ekologio; **Bibliologio:** Evoluo de la titola paĝo; **Fiziko:** Kondensiĝaj problemoj en la kamentuboj ĉe gashejtado; Energio de hidrogena atomo, retermino de transformatora konektogrupo / **Geologio:** Biogenezo en la medio de prekambrio kaj kambrio / **Kemio:** Mezurado de varmo-efekto ĉe la kristalig-procezo el solvaĵoj; Metaloj kaj nia mondo; **Lingvistikofilologio:** Pri la kompleksaj vortoj en Esperanto; La karaktero de la geografiaj propraj nomoj; Apliko de la mediala voĉo; La akuzativo kaj la direkta -n ĉe lokaj adverboj en Esperanto; La frazakcento en Esperanto; La plej fruaj senafiksaj kunmetaĵoj en Esperanto; La valoro de la geografiaj sufiksoj / **Marbiologio:** La natura ekonomio de la maro / **Matematiko:** Ĝenerale pri tensiolensoro / **Medicino:** Stato de seraj proteinoj en sango; Influo de limfadenektomio kaj injekto de limfadena ĉelsuspenso al la vivkapablo ĉe vejna alografto / **Muzikologio:** Hungara popolkanto / **Pedagogio:** Pri psikologio de la instruado; Edukaj fenomenoj en turismo; Perkomputera scienca edukado / **Teksadtekniko:** Tredo, tretado, ligo; **Veterinarmedicino:** Studo de elektroforezaj proteinfakcioj ĉe porkidoj tuŝitaj per kolibacilozo.

★

Ĉebalta Esperantista Printempo 1977

Mi partoprenis la ĈEP kaj devas diri, ke ĝi estis belega aranĝo; en familia atmosfero la ĉeestintoj travivis tagojn de la amikeco kaj kulturajn kulminojn.

La ĉijara ĈEP okazis de 20. – 26. 5. 1977 en Mielno ĉe Koszalin en Pollando. La interesa kaj multflanka programo, i. a. enhavis urborigardojn, prelegojn, koncertojn, akcepton ĉe la urbestro de Koszalin, bivakfajron k. a. Partoprenis 80 personoj el Pollando, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Bulgarujo, Svedujo, Danlando kaj el GDR (14). Ĉiuj aranĝoj estis bonege organizitaj, la tagoj fariĝis neforgesebla travivaĵo.

Carola Lehr

TUSE 1977

SELKO, SELZO, TUSE . . . babelo de mallongigoj el Slovakio, sed ili kaŝas interesajn kaj valorajn aranĝojn, kiujn ĉiujare organizas slovakaj esperantistoj. Mirindaj organizantoj kaj tre afablaj gastigantoj, la slovakaj esperantistoj ofertis per sia Turisma Semajno Esperantista ĉe Čingov (Spišská Nová Ves) al la ĉirkaŭ 120 esperantistoj el Bulgario, ČSSR, GDR, Hungario, Jugoslavio kaj Pollando riĉan turisman programon, kiun animis la aktivuloj M. Zvara d-ro Lukaš, ges-roj Bednařik, P. Nikodem kaj P. Pavluk, por nomi nur kelkajn.

Ĉiutage oni povis elekti tri ekskursojn en la belan „Slovakan Paradizon" aŭ en la Altajn Tatrojn (per „Juventura" Buso), vespere lumbildprelegojn, tendarfajrojn, amikajn interparolojn . . .

La slovaka movado disponas pri mirindaj aktivuloj, kiuj kapablis organizi 1977 pli ol 30 renkontiĝojn kun eksterlanda partopreno. Por 1978 i. a. estas antaŭviditaj:

- *Vintra esperantista renkontiĝo en Altaj Tatroj, 24. — 26. 02. 78, Tatranská Lomnica, Altaj Tatroj, planita nombro — 100, partopreno ankaŭ eksterlanda, kultur-turisma aranĝaĵo.*
- *Somera Esperanto-Lernejo, Košické Hámre, proksime al Košice, če akvobaraĵo Ruĵín, 9.— 22. 07. 78, planita nombro 100, partopreno eksterlanda, kursoj A— por komencantoj, B— konversacia kurso, C- por progresintoj, D— seminario / sekcioj pedagogia, literatura, organiza, historia ktp. / Deviga partopreno en la kursoj / 50 instruhoroj dum 13 tagoj /.*
- *Turisma semajno en Slovaka Paradizo, proksime al urbeto Sp. Nová Ves, 12. — 18. 08. 78, planita nombro 200, partopreno eksterlanda. En programo perpiedaj kaj perbusaj ekskursoj, vespere kulturaj programoj, prelegoj, nur por esperantistoj.*

Do valoras viziti Slovakion kaj konatiĝi kun la slovakaj esperantistoj.

D. B.

SELKO 77

La Somera Esperanto-lernejo (SELKO-77) okazis ĉi-jare honore al la grava 60-a datreveno jubileo de la Granda Socialisma Oktobra Revolucio. Ĝi denove okazis en bela medio de la orienta parto de Slovakia Ercmontaro, ĉe valbaraĵo Ružin, apud vilaĝo Krošicka Bela, proksime de la urbo Košice.

Ni lernis Esperanton kaj ripozis en kabanoj, troviĝantaj sur la bordoj de la valbaraĵo, kiun ĉirkaŭas silenta kaj ravige alloga naturo. En la programo estis, kiel kutime, Esperanto-kursoj en grupoj: A — por komencantoj, B — konversacia kurso, C — por progresintoj kaj D — seminario. Oni instruis 5 instruhorojn tage krom sabato kaj dimanĉo. La organiza komitato de SELKO-77 povis bonvenigi partoprenantojn el Bulgario, GDR, Hungario, Jugoslavio kaj el Pollando.

La feriado en SELKO-77 estis denove tre bona kaj utila ripozo.

Mi nur povas rekomendi partoprenon en SELKO - 78.

Marion Stein

Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco - atentinda evento

Sep esperantistoj-medicinistoj el GDR sekvis la inviton de UMEA (Universala Medicina Esperanto-Asocio) kaj de la Studenta Esperanto-rondo de la Socialisma Asocio de Polaj Studentoj en la Medicina Akademio en Krakovo kaj partoprenis la Internacian Medicinistan Esperanto-Konferencon de 13-a ĝis 17-a de julio 1977 en Krakovo, Pollando.

Gastiganto por la 54 medicinistoj el Bulgario, ČSSR, GDR, Hungario, Pollando, Rumanio kaj Usono estis la Medicina Akademio „Nikolao Koperniko“ Krakovo.

Jam la solena malfermo en la historia akademia salonego „Nowodworskiego“ certigis valorajn, enhavoriĉajn konferencajn tagojn. La prestiĝo de la esperantistaj aktivadoj reflektiĝis por la ĉeesto de la vicrektoro de la Medicina Akademio, Prof. D-ro Zofia Kobielowa, de reprezentantoj de la urbo Krakovo, de la vojevodio Krakovo kaj de la Kvartala kaj Altlerneja Komitatoj de la Pola Unuiĝinta Laborista Partio.

La antaŭtagmezoj estis rezervitaj por prelegoj kaj diskutoj. La paroladoj pri ĝenerale interesaj temoj el diversaj medicinaj fakoj, ekzemple el la fiziologio, la bakteriologio kaj la otolaringologio, sed ankaŭ pri problemoj de la ĉiutaga kuracista praktikado kaj pri la akupunkturo, demonstris la eblojn de senpera internacia lingva komunikado sur profesia ebeno helpe de Esperanto. Interkonsiliĝoj pri la aplikado de Esperanto en la medicino okupis vastan spacon.

Ne nur pro la perfekte organizita kadra programo la konferenco estas ripetinda kaj imitinda ekzemplo. La gekolegoj vizitis la anatomian, patologian kaj farmacian muzeojn de la malnova akademio. Ankaŭ la vizito de la subtera salmineja sanatorio en Wielicka-ekskluzive aranĝita por la konferencanoj — trovis specialan intereson.

En la iama koncentrejo Auschwitz en Oświecim la internacia kolegaro, profunde tuŝita, honoris la viktimojn de la faŝisma barbareco. Reprezentantoj de la diversaj landaj delegacioj kuŝigis florbindaĵojn ĉe memorigaj lokoj.

Dum la adiaŭa bankedo la esperantistoj de Krakovo prezentis forte aplaŭditan entuziasmigan programon en Esperanto. Gekolegoj el la di-

versaj landoj estis distingitaj per la Nikolao-Koperniko-Medalo de la Medicina Akademio Krakovo.[1])

La organiza komitato de la konferenco, antaŭ ĉiuj s-ano Vladimir Opoka, meritas nian koran dankon pro la sukcesaj kvin tagoj en kolegeca atmosfero.

La interkolegaj konatiĝoj, la spertinterŝanĝoj, la reciprokaj informoj-ĉio signifas alttaksendan instigon al aktivigo de la Esperanto-movado sur la kampo de la medicino.

La dua Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco okazos 1979 en Hódmezövásárhely, Hungario.

D-ro Giso Brosche

---

[1]) Inter la distingitoj ankaŭ troviĝas d-ro Giso Brosche. Korajn gratulojn.

En „Humanitas"

En la semajna revuo de la medicinistoj „Humanitas", 18/1977, p. 11 aperis artikolo pri la medicinista renkontiĝo en Krakovo. (vidu paĝon 19).

Mediziner und Esperanto

Eine Arbeitsgruppe der Mediziner, die Esperanto für ihre fachlichen Interessen verwendet, befindet sich im Aufbau. Alle Esperantisten, die im medizinischen Bereich tätig sind und an einer fachspezifischen Arbeit interessiert sind, mögen mit Dr. Giso Brosche, (7981 Rückersdorf), Mitglied des Zentralen Arbeitskreises Esperanto, Verbindung aufnehmen.

Internacia esperantista medicinista renkontiĝo

Ĝi okazis de 19. — 29. 7. 1977 en Hódmezövásárhely/Hungario kaj partoprenis ĝin krom hungaraj esperantistoj ankaŭ 12 esperantistoj el Schwarzenberg/GDR. Dum la renkontiĝo oni prezentis fakajn prelegojn kaj distrajn programerojn. Oni planas organizi 1978 eŭropan medicinistan Esperanto-renkontiĝon.

Renkontiĝo kun francaj esperantistoj

De la 4-a ĝis la 22-a de aŭgusto 1977 feriadis k-do GILBERT GERRIER el Francio kun sia edzino en Oberhof.

Kamarado Gerrier estas la prezidanto de la francaj laboristaj esperantistoj (Féderation Esperantiste du travail).

Vendrede, la 19-an de aŭgusto Esperanto-amikoj el la distrikto Suhl organizis rendevuon kun k-do Gerrier kaj lia edzino en la ripozdomo „Glückauf" en Oberhof. La renkontiĝo okazis en spirito de vera interpopola amikeco. En gaja rondo la partoprenintoj interparolis i. a. pri la Esperanto-movado en Francio, pri aferoj de la politiko kaj ĉiujara vivo en Francio kaj GDR kaj pri personaj kaj profesiaj problemoj.

Reciproka interŝanĝo de memorigaj donacoj finis la amikecan renkontiĝon.

Ingwart Ullrich

Fachgruppe Eisenbahner-Esperantisten

Auf der 2. Sitzung des Zentralen Arbeitskreises Esperanto am 21. und 22. 5. 1977 in Neubrandenburg wurde eine Fachgruppe der Eisenbahner-Esperantisten beim Zentralen Arbeitskreis im Kulturbund der DDR gegründet (vgl. „der esperantist" 4/77, S. 19). Diese Fachgruppe wird in Zukunft die Arbeit der Eisenbahner-Esperantisten in der DDR koordinieren und anleiten. Alle Mitarbeiter des Eisenbahnwesens der DDR, die über Esperanto-Kenntnisse verfügen und Interesse an einer Mitarbeit in dieser Arbeitsgruppe haben, mögen den Zentralen Arbeitskreis über ihre Bereitschaft zur Mitarbeit informieren.

Hungaraj fervojistoj

La hungara IFEF-sekcio aranĝis sian renkontiĝon ĉijare la 2-an kaj 3-an de julio en Köszeg kaj Stombathely.

En la nomo de la fervojista fakgrupo ĉe CLE la renkontiĝon partoprenis Horst Theurich el Weimar.

Renkontiĝo en Ostrov

Ĉeĥaj esperantistoj aranĝis de 26. — 28. 8. 1977 en Ostrov amikan renkontiĝon kun esperantistoj el la distrikto Karl-Marx-Stadt, kiun partoprenis pli ol 100 personoj. La interesajn prelegojn pri 60 jaroj Ruĝa Oktobro kaj 90 jaroj Esperanto kaj la kulturprogramon (kantis aktoroj el Usti) partoprenis pli ol 100 personoj.

Sako kaj glumarkoj

Ekde la 10-a de marto okazas la II-a teamturniro de EŜLI (= Esperanta Ŝak-Ligo Internacia), en kiu partoprenas 21 teamoj el 14 landoj. En ĉiuj teamoj ludas po 4 ŝakistoj. En la GDR-teamo ludas: K. D. Stegmann, E. Schütze, A. Knapp kaj H. Kirmse (turnirgvidanto).

Ĉu vi interesiĝas pri korespondŝako? Do skribu al A. Knapp, 5302 Bad Berka, Domagkstr. 7, se vi volus partopreni individuajn turnirojn, ĉar teamturniro III komenciĝos ne pli frue ol en 1979.

Esperanto-glumarkojn interŝanĝas (ev. aĉetas) A. Knapp, 5302 Bad Berka, Domagkstr. 7.

Distingo por Ernst Schonert

Por meritoj en kulturliga esperantista agado Ernst Schonert, prezidanto de DLE Berlin ricevis la Medalon pro meritoj por GDR.

Gratulon al la distingito.

CLE

Vojaĝo al USSR

Pro sia longjara aktivado en Kulturligo por Esperanto la sekretario de DLR Rostock, Werner Plate, estas distingita per 8-taga vojaĝo al Moskvo kaj Leningrad. La vojaĝon pagis Kulturligo.

Tre korajn gratulojn pro la distingo. *DLE*

Methodik - Kommission

Die Methodik-Kommission des Zentralen Arbeitskreises Esperanto unter Leitung ihres Vorsitzenden Dr. Till Dahlenburg beriet am 25. 7. 1977 über die nächsten Aufgaben.

Es ist vorgesehen, in „der esperantist" Artikel über methodische Fragen des Esperanto-Unterrichts zu veröffentlichen sowie ein Begleitmaterial für das 1978 erscheinende Esperanto-Lehrbuch von Till Dahlenburg / Peter Liebig zu erarbeiten, das für Fernkurse Verwendung finden wird. Weiterhin werden methodisch-pädagogische und fachliche Handreichungen für Kursusleiter erarbeitet, die zur Erhöhung des Niveaus der Esperanto-Kurse beitragen sollen.

Alle **fachlich ausgebildeten Lehrer**, die über Esperanto-Kenntnisse verfügen und bereit sind, in der Methodik-Kommission mitzuarbeiten, werden gebeten, ihr Interesse dem Zentralen Arbeitskreis mitzuteilen. Die Leitung eines Kurses ist für diese Mitarbeit keine Voraussetzung.

★

En eksterlerneja instruado

Esperanto en lernejoj de nia respubliko nun povas esti samrajta kun la alia eksterlerneja instruado en ĉiu rilato. Nature vi devas havi kaj noti programon por la ĉefaj edukaj celoj. En la libron „laborkomunoj" vi ĉiusemajne enskribu la pritraktitajn problemojn kaj la ĉeestantecon de ĉiu lernanto.

Kara kursgvidanto! Ĉu vi ne emas komenci kurson por geknaboj en lernejo aŭ interesigi kapablan profesian instruiston? Por la komenco estas plej favora la sesaj klasoj.

Jen la laborordono, kiun mi ricevis oktobre 1976:

„1—e prepari la francan fremdlingvan instruon, komencanta de la 7-a klaso (Esperanto kiel baza lingvo)
2—e dum la lerneja foiro montri mallongan programon kaj ekspozicii la interligitajn korespondaĵojn kun la amikaj landoj."

Kurt Heeg, Esperanto-kursgvidanto, Fraureuth

★

En popolaj altlernejoj

Esperanto enpenetras en la popolajn altlernejojn de GDR. Antaŭ kelkaj jaroj oni instruis Esperanton en la popolaj altlernejoj de Schwerin kaj Potsdam. Lastatempe pli kaj pli da popolaj altlernejoj pretas akcepti Esperanton kiel instruobjekton. En Berlin jam funkcias (ekde 1976) la dua kurso (kp. „de" 2/77, p. 18).

Krome en la popolaj altlernejoj de Freiberg, Karl-Marx-Stadt, Magdeburg, Fürstenwalde, Gräfenhainichen, Bitterfeld kaj en aliaj urboj Esperanto jam estas instruata aŭ la instruado estas planata.

La granda avantaĝo de tia instruado i. a. estas:

1. La popola altlernejo oficiale varbas por Esperanto.
2. Ĝi pagas la instruiston.

Belartaj konkursoj

Sendube troviĝas inter niaj esperantistoj junaj talentoj, kiuj kapablas verki literaturaĵojn. Sed ili ne konscias pri la atingita stato de siaj konoj. Pro tio UEA jam longe aranĝas ĉiujare „belartajn konkursojn". Por tiuj, kiuj havas intereson pri la konkursoj, ĉi-sube ni konigas la kondiĉojn de la partopreno.

Oni povas konkursi nur per verkoj originalaj / la tradukaj branĉoj estis forigitaj /. Ekzistas do la sekvaj branĉoj:

1. **Originala poezio.** / Maksimuma longo de poemo ne estas fiksita. /
2. **Originala prozo.** / Maksimuma longo de verko estas 200 linioj × 65 maŝinskribitaj spacoj, t. e. „liter-spacoj". /
3. **Teatraĵo originala.** / Maksimuma ludodaŭro de teatraĵo estas 25 minutoj. Oni povas konkursi en tiu ĉi branĉo ankaŭ per radio-ludoj. /
4. **Por la „Premio Minnaja".** / Eseo originala pri temo lingva, literatura, historia aŭ sociologia, prefere en ligo kun la Internacia Lingvo aŭ ĝia uzado. Minimuma **amplekso** estas 400 linioj × 65 maŝinskribitaj spacoj, t. e. ĉ. 10 paĝoj. /
5. **Fotografio.** / La fotografaĵoj povas esti nigra-blankaj aŭ koloraj, kaj de minimuma formato 13 × 18 cm. /

En ĉiuj branĉoj povas konkursi ĉiuj esperantistoj, escepte tiujn, kiuj jam gajnis unu premion en la koncerna branĉo. Unu persono povas partopreni per maksimume tri verkoj en unu branĉo, sed kompreneble ĉiuj rajtas partopreni en pluraj branĉoj.

Ĉiujn verkojn oni devas signi per pseŭdonimo, kaj oni aldonu en fermita koverto sian veran nomon kaj adreson. Ĉiun konkursaĵon oni devas sendi en 4 ekzempleroj al la sekretario de la Belartaj Konkursoj / S-ro Alec Venture, 55 Park Hill; Carshalton, Surrey, SM 5 3 SE, Anglio /.

La konkursaĵoj por la literaturaj branĉoj devas atingi la sekretarion ĝis la 31-a de marto de ĉiu jaro. Konkursaĵojn por la branĉo fotografio oni sendu al la adreso de LKK en la Kongresurbo [1]), kaj ili devas atingi tiun adreson ĝis la 1-a de julio de ĉiu jaro.

Do ek, verkemuloj!

[1]) [Loka Kongresa Komitato, 63-a UK, Sofia. Bul. Ĥristo Botev 97, Bulgario]

★

3. Esperanto estas oficiala instruobjekto. Tio levas la prestiĝon de la lingvo.
4. Post sukcesa ekzameno oni ricevas oficialan atestilon, kiu estas pli valora ol iu esperantlingva.

Kompreneble nur vere bone kvalifikitaj esperantistoj sin povas oferti por la ofico de la instruisto.

Ĉiukaze la Distrikta Laborrondo devas decidi pri la instrupermeso. Malbona instruisto povas tute fuŝi la akiritan pozicion.

Krome necesas, ke la instalo de la kursoj en la popolaj altlernejoj ĉiam okazu en kunlaboro kun Kulturligo.

[redacted]

[redacted]

Stojan Šopov, Delegito de UEA, PK 132, **7700 Târgovište,** dez. kor. tutmonde
Geamikoj de la esp-societo „Verda Eskadrono", PK 132, **Târgovište,** dez. kor. tutmonde

[redacted]

Willy Ehlers, **110 Berlin,** Hollandstr. 24. komencanto, 56j., iama flegisto, nun invalidpensiulo, dez. konversacii k. samaĝa E-isto el Berlin; dez kor. k. samaĝulo pri urbohistorio, pref. el Bulgario k Ukrainio
Karin Gergs, Psf. 6, **16 Königs Wusterhausen,** 33j., dez. kor. k. komencantoj tutmonde pri ĉ. t., prec. pri literaturo k. modo, kol. pm, bk
Artpedagogo, 50j., dez. kor. tutmonde pri belarto: Wolfgang Göpel, Julius-Bremer-Str. 4, **321 Wolmirstedt**
Komencanto, inĝeniero, Klaus Lorenz, Mühlenweg 32, **1832 Premnitz,** dez. kor. tutmonde pri sporto, futbalo, kol. futbalinsignojn
Lothar Müller, **1277 Waldsieversdorf,** Dahmsdorfer Str. 2c. Fach 06/127, 35j., dez. kor. k. gek-doj el soc. landoj
Kadre de nova E-kurso ni aranĝos je la 20. 1. 1978 letervesperon. Salutleterojn k. koresponddezirojn sendual: Kulturbund der DDR, KAG Esperanto, **27 Schwerin,** Wilhelm-Pieck-Str. 8

[redacted]

Fervojisto dez. kor. k. fervojistoj (aŭ aliaj) el GDR, prec. Berlin: Bruno Faradoni, 18, rue Anquetil, **51100 Reims**

[redacted]

Dez. koresp. pri la politikaj problemoj en Saharo. Jesuo Perez de Amikoj de Sahara. Apado — 940, **Las Palmas,** Canarias, España

[redacted]

Komencantino, 14j., dez. kor. k. geesperantistoj el GDR: Noriko Kondo, 17 hirake 3 chome, **Nakamura-ken,** Nagorja-city aichi, 453, Japanio

[redacted]

[redacted]

26j. programisto dez. kor. k. esp. el GDR, Soveta Unio, CSSR, Pollando, Bulgario, Kubo, pri vojaĝoj, kol. pm: Ion Vajda, Dupâ Iniste 44, **2200 Brasov**

[redacted]

Junaj komencantoj dez kor., kol. Il.pk: Klub intern. drujbi, Škola 7, **Kusa, Čelabinskaja obl. 456930**

Junulo, 14j., dez. kor., kol. pm, bk, esp.-librojn k. revuojn: Tönu Onnepalu, Vikerkaare 34, **200009 Tallinn,** Estonio

Nova esperantisto dez. kor.: Rudzinskui Valerijee, **234442 Stokiai,** Jurbarko raj., Litovio

Aleksandr Syčev, **Tuljskaja obl., g. Efremov-2,** ul. Sadovaja 152, dez. kor tutmonde pri parapsikologio

Instruisto, 25j., dez kor. tutmonde p. ĉ. t.: Juris Cibulis, Balvu raj. **228772 Tiža,** Latvijas PSR

[redacted]

46j. muzikisto (trombonisto) dez. kor. k. geesperantistoj el GDR pri klasika muziko: Bertil Englund, Hagalundsg. 22, **S-214 32 Malmö**

Jan Vedevik, Poste restante, **S-401010 Göteborg I,** 60j., dez kor. pri literaturo k. Šako

Herausgeber: Kulturbund der DDR (Zentraler Arbeitskreis Esperanto).
Redaktion: 108 Berlin, Charlottenstr. 60. Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke. Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. - Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. - Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckwerkstätte Glauchau
Artikel-Nr. (EDV) 7928 III-12-8 1080